

# Pola Esperantisto

## Esperantysta Polski

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE  
MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ

ELDONANTOJ: POLA ESPERANTISTA KLUBO &  
WYDAWCY: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW.

REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI  
REDAKTANTOJ

XXVII JARO  
NR. 8 — 9.

Redakcio kaj  
Administracio  
Abonprezroj ktp. vidu ĉe fino de 1<sup>a</sup> tekstoparto.

AŬGUSTO  
SEPTEMBRO  
1933.

## La unuecigo de la Esperanto-Movado.

### „INTERKONSENTO DE KOLONJO“.

Universala Esperanto-Asocio, Konstanta Repraentantaro de la landaj Esperanto-asocioj kaj Universala Esperantista Federacio interkonsentas pri la ĉi subaj aranĝoj:

I. Universala Esperanto-Asocio estas la tutmonda organizajo Esperantista, reprezentanta la Esperanto - movadon kaj organizanta la universala'n kongresojn.

II. La landaj Esperanto-Asocioj aligas siajn membrojn al U. E. A., se ili plenumas la jenajn kondiĉojn:

1. posedi organizan formon (regularon, konsiston de komitato, k. c.), kiu vidigas klare, ke temas pri landa asocio neŭtrala.
2. havi minimume 100 membrojn.

Pri la akcepto decidas la Komitato.

III. La landaj Esperanto-Asocioj aligas siajn membrojn al U. E. A. laŭ la jenaj kondiĉoj:

1. ili pagas jarkotizon de Sv. fr. 0.50 por ĉiu el siaj regulaj membroj; ĉi-tiuj membroj estas simplaj membroj de UEA, ili rajtas ricevi la internacian membrokarton kaj uzi la servojn de la delegitoj pri vojaĝhelpo kaj informpetado.
2. la landaj asocioj pagas aldonan kotizon por tiuj membroj, kiuj deziras ricevi la jarlibron aŭ la jarlibron kaj la gazeton de UEA; tiuj ĉi membroj estas nomataj membroj aktivaj. La landaj asocioj sindevigas varbi kiom eble plej multe da tiaj membroj.

IV. En landoj, kies asocio aligis siajn membrojn, oni aldonas al la kotizo el ĉiu kategorio proksimume 50% de la normala kotizo de la nuna membro kun jarlibro, por tiuj membroj, kiuj ne apartenus al la landa asocio. Tamen la ĝisnunaj membroj de UEA ne apartenantaj al la landa asocio povas resti membroj laŭ la ĝisnunaj kondiĉoj, ĝis fino de 1936.

V. La landaj asocioj prenas sur sin la administradon de la membroj en sia lando, laŭ la reguloj de la Centra Oficejo, kaj nomas ĉefdelegiton interkonsente kun UEA.

VI. La landa asocio nomas la lokajn delegitojn interkonsente kun la ĉefdelegito kaj komunikas la liston al la Centra Oficejo.

VII. La Internacia Komitato de UEA konsistas el:

- a) Komitatanoj elektitaj de la landaj Asocioj aligintaj siajn membrojn;
- b) Komitatanoj elektitaj de la lokaj delegitoj en la landoj, kies landa



7. 12844

asocio ne jam aligis siajn membrojn kaj en la landoj, kie ne jam ekzistas landa asocio;

c) Komitatanoj elektitaj de la komitatanoj sub a) kaj b).

Ĉiu landa asocio kun minimume ducent ĝis mil membroj elektas unu komitatanon kaj plian por ĉiu komencita milo da membroj, por kiuj ĝi pagis kotizon por la pasinta jaro.

La lokaj delegitoj de la landoj, kies landa asocio ne jam aligis siajn membrojn aŭ kie tia asocio ne jam ekzistas, elektas grupe po unu komitatano por ĉiu kvincento aŭ komencita kvincento da membroj.

La komitatanoj sub a) kaj b) povas nomi komitatanojn sub c) ĝis la triono de sia propra nombro.

Ĉiuj komitatanoj havas samajn rajtojn kaj devojn.

VIII. La fakaj societoj, institucioj, k. t. p. povas sin enskribigi kiel partoprenantojn en la ĝenerala Esperanto-movado, kontraŭ fiksita pago.

IX. Okaze de ĉiu Universala Kongreso de Esperanto kunsidas „Konsilantaro de la Esperanto-Movado“. Ĝi konsistas el: la komitatanoj de UEA, la reprezentantoj de la aliĝintaj landaj asocioj havantaj malpli ol 200 membrojn, la ĉefdelegitoj aŭ iliaj reprezentantoj, la honoraj membroj, la dumvivaj membroj, la patroj kaj la reprezentantoj de la asocioj kaj institucioj registritaj kiel partoprenantoj en la ĝenerala Esperanto-Movado. Tiu Konsilantaro esploras la jarraportojn pri la stato de la movado, konsideras proponojn pri disvastigo kaj utiligado de la lingvo kaj preparolas programon de laboroj entreprenotaj. Ĝi decidas per plimulto de la ĉeestantoj en formo de deziresprimoj, kiujn ĝi transdonas al la Komitato de UEA.

X. Post sia likvido ICK, KR kaj U. F. E. transdonas al UEA siajn havaĵojn kaj dokumentojn. La Komitato kaj Centra Estraro fiksos la novajn devojn de la ĝisnunaj direktoroj kaj oficistoj de ICK kaj de UEA.

XI. Necesaj ŝanĝoj en la regularo de UEA estos tuj farataj laŭ la ĉisupraj aranĝoj. La nuna Komitato de UEA sendos la ŝanĝojn al la delegitoj por ke la voĉdono estu finita je la fino de Oktobro 1933.

XII. La landaj asocioj elektos siajn respektivajn komitatanojn antaŭ la 15-a de Oktobro 1933.

XIII. La neceso estos farata por ke la nova aranĝo ekfunkciu je la 1-a de Novembro 1933.

Kolonjo, la 4-an de Aŭgusto 1933.

La „Interkonsento de Kolonjo“ de la 4a de Aŭgusto 1933 pri la unuecigo de la Esperanto-Movado estis subskribata en la solena ferma kunsido de la 25a Universala Kongreso, de jenaj samideanoj:

Ed. Stettler	Frans Schoofs	D-ro A. Vogt
Johannes Karsch	Robert Robertson	Arnold Behrendt
Louis Bastien	P. W. Baas	Einar Dahl
Cecil C. Goldsmith	J. R. G. Isbrücker	A. Clavenna
P. Petit	M. Inouye	Dr. Julian Loyola
Georgo Canuto	M. De Ketelaere	Ildefonso Falcao
Arne J. Tharaldsen	D-ro R. Maeder	D-ro Ernst Meyer
Charlotte Jablonski	Paul Blaise	Adolf Münz
H. Moy Thomas	Paolina Mellina	Schmalzl
S. Alberic Joffé	Hans Jakob	Robert Kreuz

## **SOBRE KAJ DECIDE.**

(KONGRESANO KIU KONGRESIS).

I. Leizerowicz.

Mi scias: multaj ne deziras, ke oni parolu pri la nunjara kongreso en Kolonjo. Aliaj ne deziras, ke oni almenaŭ parolu tiel ofte pri tio. Sed, bedaŭrinde, mi nek la unuajn, por kiuj la afero ne estas oportuna, nek la aliajn, por kiuj ĝi estas malagrabla, povas kontentigi. La okazigo de la nunjara kongreso en Kolonjo estis ne nur mispaŝo de niaj ĉefaj instancoj, sed ĝi estis dolora ofendo al

la idea esperantismo, al la altaj noblaj ideoj, kiuj estas skribitaj sur la verda standardo. Okazigante la kongreson nunjare en Kolonjo, en ŝtato kiu distretas la primitivajn homajn rajtojn, niaj gvidantoj pruvis, ke ilia agado estas senigita je la fundamenta esperantista idealismo, kaj tiu fakto por ni, ideaj esperantistoj, estas malagraba seniluziigo kaj vekas en ni nekutiman malbonguston. Kaj se la koncernaj esperantistoj ne bonvolis atenti la dolorplenajn protestojn, venantajn el ĉiuj flankoj de la mondo, kaj malgraŭ ĉio okazigis la kongreson en lando, kie floras abomeninda barbareco kaj vandaleco, ili havu nun la paciencon aŭskulti la riproĉojn, kiom - ajn ofte ili antingas ilin, se ili estas respondecaj pri siaj agoj. Ĉar ni ne ĉesos paroli kaj reparoli pri tiu afero (ho ve! kion ni povas fari pli ol paroli kaj nur paroli?!) ĝis tiu makulo estos jene forviŝita.

Laŭ du vojoj iras nia kritiko koncerne la nunjaran kongreson en Kolonjo. La unua vojo kondukas nin al la organizantoj de la kongreso, do al la germanaj esperantistoj. La dua kondukas al I. C. K., la plej alta instanco de nia movado, kaj sekve de ĝi ĝenerale dependis la okazigo de la kongreso. Anticipe mi faras la rezervon, ke la analizon kaj kritikon de la faktoj mi faros el nura esperantista vidpunkto, kompreneble el vidpunkto de idea esperantisto, havanta komprenemon kaj sentemon por la bela idealisma tradicio de nia afero.

Kiam oni en Parizo akceptis la decidon okazigi la kongreson 1933 en Kolonjo, la feliĉigaj sunradioj de la svastiko ne brilis ankoraŭ super Germanujo kaj tial tiu-ĉi decido estis akceptata de la tuta Esperantista publiko kun evidenta ĝojo. Tiam kompreneble la fakto, ke iu estas idea demokrato, ne nomiĝis hontinda krimo. Tiam ankoraŭ E-eldonejo en Germanujo (ĝuste en Köln) fieris riĉigi nian literaturon per libroj de Ernest Toller kaj St. Zweig. Kaj tiam ankoraŭ la organizantoj de la kongreso konsideris kiel honorigon por si, la fakton, ke mem la ĉefurbestro de Kolono (tiam), konata socialdemokrato konsentis elekti ĝin honora protektanto de la kongreso. Tiam ankoraŭ oni ĝojis informi la esperantistaron, ke la Kolonja kongreso estos vera jubilea festo kun pompaj demonstracioj eksteraj. Nu, tiam estis tempo, ke ne en la „purra“ bruna ĉemizo troviĝis la redempto, ke ankaŭ demokrato povis esti „honestulo“, ke ankaŭ judo povis esti homo, ke Toller kaj Zweig povis troviĝi en la libroŝranko (anstataŭ sur la aŭtodafeo).

Sed subite ĉio-ĉi ŝanĝiĝis. (Kaj mi ne deziras reparoli pri la gloraj agoj, farataj en la nuna Germanujo). Kaj subite Germana Esperanto Asocio penas konvinki nin, ke en Kolonjo ĉiu vera „honestulo“ estos plej kore akceptata. Kaj subite la honora protektanto de la kongreso, la eksĉefurbestro estas arestata, kaj subite „en la trankvila Germanujo“ la kongreso — kiel proksime antaŭ la kongreso raportis Heroldo — ne povos okazi kun la anoncita antaŭ unu jaro pompo ekstera. Kial subite tiuj ŝanĝoj? mi demandas. De kiam oni kvalifikas la kongresanojn kiel honestajn kaj nehonestajn? Kaj kion ĝustadire la kongresestroj nomas ĝenerale „honesteco“? Kial en la „trankvila lando“ ne povis okazi la ekstera pompo? Kaj kial estis arestata la honora protektanto de la kongreso? Ĉu ankaŭ li, pri kiu la organizantoj tiom fieris antaŭ unu jaro, elmontriĝis nun malamiko de Germanujo? Nekredeble!

Estis ridinde imputi al la tutmonda esperantistaro tiom da naivajoj, kiel faris tion la germanaj E-gazetoj, por altiri la publikon al Kolonjo kaj eviti fiaskon de la kongreso. Per invito al nuraj „honestuloj“ Germana E-Asocio ja nur kompromitis sin. Kiu havas nefermitajn okulojn kaj orelojn, tiu scias, kiu en la nuna Germanujo nomiĝas „honestulo“.

Sed ankoraŭ pli multe kompromitis sin la I. C. K., kiu malgraŭ la protestoj venantaj el ĉiuj flankoj de la mondo, decidis la kongreson tamen okazigi en Kolono kaj en lando, kies reĝimo oficiale kontraŭbatalas Esperanton! I. C. K. ne reagis kontraŭ la aresto de la honora protektanto de la kongreso — ĝi tute ne rimarkis tiun humilegigan ofendon! I. C. K. ne rimarkis, ke la Tria Regno dispremas la kulturon, kies devizoj kiel evangelio fascinas sur la verda standardo, kies honoron kaj prestiĝon ĝi havas la devon gardi! Timeme kaj humile ĝi venis al la malriĉa festeno en Kolonjo, preferante la gracoplenan geston de tiuj, kiuj publike librojn bruligas kaj noblajn kulturportantojn enkarcerigas! I. C. K. ne atentis, ke la Tria Regno estas „kontraŭ la inokulado de venenaj instruoj pri homarkulturo, pacifismo, internaciismo, parlamentismo, demo-

krateco k. a". (Rosenberg: Wesen, Grundsätze und Ziele der nazisozialistischen Bewegung), ĝi forĝesis, ke la esperantismo batalas pro tute aliaj celadoj, kiaj estas ĝuste homarkulturo, ĝuste pacifismo, ĝuste internaciismo kaj demokrateco. I. C. K. forĝesis, ke niaj devizoj estas egaleco inter popoloj kaj gentoj, inter religioj kaj rasoj, ke ni volas rompi la miljarajn murojn kiuj dividas la popolojn — kaj I. C. K. ne timis perfidi la altajn idealojn Zamenhofajn por eviti la koleron e la Tria Regno! Kun kia doloro kaj ignoro ni konsciigas al ni tiun-ĉi teruran mispaŝon de nia ĉefa instanco.

Ni rajtis esperi, ke I. C. K. agos alie en tiu afero: ke ĝi delikate komprenigos al la organizantoj en Köln, ke ne estas nun la taŭga momento por kongresi internacie en la Tria Regno. Kaj tiam ekestus la jena alternativo: aŭ la plimulto el la germana esperantistaro estas kulturidea anaro, tiam ili tute certe preferus ne okazigi la kongreson en la nuna Germanujo interkonsente kun I. C. K. — aŭ la germanaj esperantistoj estas adeptoj de la Tria Regno, bruligantoj de Toller kaj Zweig, malamikoj „de venemaj instruoj pri homarkulturo k. t. p.“ forĝantoj de absurda „rasteorio“, unuvorte vandaloj kaj barbaroj — kaj kaj tiam ni, ideaj esperantistoj, alte taksanta la verdan standardon, volas havi kun ili nenion komunan, kaj por nenja prezo volas iri al la funebra festeno en Kolonjo! En tiu alternativo ekzistas nenja kompromisemo. Ĝi estas demando pri kulturo aŭ barbareco — kaj tiun demandon ĉiu el ni devas klare, sen serĉado de pretekstoj, respondi.

Se tamen I. C. K. opiniis utila la okazigon de la kongreso en Kolonjo nunjare, se ĝi „kaŝis en tirkeston“ la senvaloran verdan standardon, kaj iris en la Trian Regnon por „jubilei“, kiam la plej bravaj amikoj de la verda standardo putras kaj suferas en la karceroj kaj koncentraciaj tendaroj; se ĝi venis en la Trian Regnon por kanti la Zamenhofan himnon, kiam difuzas ankoraŭ en la aero kaj gratas la gorgon la haladzo el la libro-aŭtodafeo; se ĝi propravole iris en la trian regnon, kiu cinike kaj vandale neniigas ĉion, kion inter aliaj ankaŭ karakterizas la esperantismon — tiam ni postulas klarecon. Tiam ni postulas revizii la esencan karakteron kaj ideologion de la esperantismo! Tiam ni faru krucon super la glora kulturidea tradicio esperantista kaj ni deklaru ke Esperanto estas nur kaj sole lingvo kaj nin tute ne interesas, kiu uzas ĝin: Zamenhof aŭ Goebbels; ke esperantisto rajtas bruligi librojn de Toller, Zweig, Mann, Spinoza, Wassermann, Einstein — kaj malgraŭ ĉio kalkuli je solidareco de la tutmonda „samideanaro“; ke esperantisto rajtas lanĉi zoologian antisemitismon kaj aranĝi mezepokan inkvizicion — kaj tamen aparteni al la „granda rondo familia“...

Sed tiam, karaj ĝeamikoj, kion komunan kun Esperanto kaj esperantismo, kion komunan kun la esperanto - movado povas havi mi, ne: ebonigebla zamenhofano kaj naiva kredanto je pli feliĉa kultura estonteco.

Pola Studenta Esperantista Societo - Warszawa, ricevis de Unuiĝo de Hungara Studenta Junularo jenan alvokon pollingve.

## A L V O K O

al Pola Junularo en antaŭtago de gravaj datrevenoj.

Feliĉa kaj ĝojiga estas por Polujo la 1933 jaro, la jaro, en kiu Polujo povas memori al la tuta mondo siajn potencajn, pasintajn momentojn kaj grandajn meritojn por nia civilizacio: 400-jara datreveno de reĝo Stefan Batory kaj 250-jara datreveno de Viena liberigo.

Ĉe tiuj ĉi rememoroj forte batas la koroj de Poloj pro ĝojplena fiereco. Kaj ni, Hungaroj, povas kunsenti kaj kompreni Vin, Pola Junularo, des pli, ke ni estas ligitaj per ambaŭ jubileoj.

Ja granda pola reĝo, Stefan Batory, estas sango de nia sango-reginto de Sepkastellando (Transilvanio). Liaj brilaj venkoj kontraŭ rusoj

haltigis por cent jaroj ilian puŝadon al Poloj. Połock, Wielkie Łuki, Psków! — kiom da bildoj kaj pripensoj ili prezentas al ni. Flugilmurmuroj de pola husararo kaj mezura paŝadeĥo de hungara infanterio, servantaj al unu celo, estas simbolo de niaj komunaj aferoj. Sendito, peteganta helpon por la potenca imperiestro, jen gravega momento! Ankaŭ sur la aliaj kampoj estas konstanta agado de la reĝo. Ni citu nur deziron fari Polujon mara potenco. Kiel tiuj ĉi demandoj estas hodiaŭ aktualaj! Sed senkompata morto forprenis Lin de ni antaŭtempe. Jes, ankaŭ al ni Hungaroj Li volis alporti liberigon kaj al Polujo potencon kaj eksterordinaran signifon.

Pro tio Lian morton priploris ambaŭ nacioj de Kolozsvar ĝis Wilno.

La jaro 1933 memorigas ree al Poloj tiun ĉi oran karton en pola historio.

Kaj ni Hungaroj ne povas hodiaŭ ne partopreni Vian ĝojon, kvankam tiu ĉi datreveno dolore memorigas al ni, ke parto de nia Patrujo, Lia lulilo, Sepkastellando, ne apartenas al ni.

Septembro 1683, estas dato de apudviena venka batalo super Turkujo de reĝo Jan Sobieski, armeestro de unuigita armeo pola-aŭstra.

La stelo de reĝo Jan hele ekbrilis sur horizonto de Eŭropo, minacita per turka invado, vekante admiron kaj dankemon de la tuta tiama civilizita mondo.

La reĝo Sobieski ne batalis por sia gloro, nek pri savo de la imperiestro aŭ de Vieno, li batalis por savi okcidentan kulturon kaj Kristanisman: Li iris, kiel Krista kavaliro, nomita de la papo Innocenty, Li iris kaj venkis: veni, vidi, Deus vicit, rompante morale kaj fizike la malamikan potencon tiamaniere, ke de tiu ĉi tempo ĝi neniam plu povis elstarigi tian armeon.

Sed la reĝo ne kontentiĝis pri tio. Malatentante penegojn kaj forlason de Germanoj, ne festante triumfojn, Li sendis al la papo verdan standardon de profeto, al amata Marysieńka sciigon pri venko, kaj iris Hungarujon, Li liberigis Győr, Komarom, Esztergom kaj Szecseny. Sur hungara tero Li ree atingis grandan venkon, kiun Li mem konsideris pli grava: la batalo apud Parkany, kiam 2.000 polaj kavaliroj pereis sur batalekampo por libereco de Hungarujo kaj la reĝo mem apenaŭ ne perdis la vivon.

Pro tio estas nia senlima dankemo al reĝo Sobieski. Per viena venko kaj per hungara kampanio Li iniciatis la liberigon de Hungarujo. Tia estas la dua datreveno, kiun solenas Polujo ĉi-jare, datreveno, kiun devas honori la tuta Eŭropo kaj Kristanismo kaj ni Hungaroj, ni unuigas kun Poloj por honori kune la heroon de Kristanismo.

La Pola-Hungara Asocio en Budapeŝto de multaj jaroj preparas sin por honori dece la reĝon Jan kaj en tiu ĉi laboro vigle helpas la hungara junularo, kiu bone scias, kion ĝi ŝuldas al pola nacio, tiomfoje sange sigelinta sian fratecon kun nia nacio. La junularo komprenas ankaŭ la gravecon de tiu ĉi solenaĵo, ĉar komuna estas nia vojo: la vojo de Batory'a kaj Sobieski'a, gardi la Eŭropon kaj esti antaŭmuro de Religio kaj Libereco. Ni devas sekvi la agadon de niaj prapatroj, ni devas memorigi al la tuta mondo, ke estis Lignica, Warna, Mohacs, Chocim, Wien, Ostrzyhom, Radzymin, Warszawa. Kaj ni devas kunligi niajn korojn.



Hodiaŭ la direktilon en Via potenca ŝtato kaj la sabron de Batory tenas la Marŝalo Piłsudski. En nia lando restis nur krom mizero, la glavvo de Sobieski sed kune kun ĝi vivas la kredo je Reviviĝo, tiel forta, kiel estis la Via.

Junularo! La hungara junularo invitas Vin partopreni la solenaĵojn de Sobieski kaj de Batory, kiuj okazos en Hungarujo la 13—17 de septembro en nuna jaro. En Ostrzyhom estos starigita monumento honore de Granda Reĝo. Malfermita estos la ekspozicio, okazos remboataj vetkuroj, renkontiĝo de aŭtoj kaj de aeroplanoj polaj kaj hungaraj, En Budapeŝto okazos kune honore al Batory kaj Sobieski, la solenaĵoj, kiuj estos indaj de tiuj ĉi reĝoj kaj de niaj nacioj.

Laŭdezire mi donas informojn samkiel „Orbis“, „Francopol“ kaj Turista Unuiĝo (Związek Turystyczny) en Kraków, kiuj aranĝos malkaran vojaĝon.

Ni atendas Vin!

Pola Sekcio de la Oficejo „MIDI“.

La 15-an de junio en la Jaro de Sobieski kaj Batory.

P. S. „Midi“ estas Studenta Landa kaj Eksterlanda Informa Oficejo en Budapeŝto, hungare: Magyar és Idegen Diákinformációs Iroda. (Red.)

## *La 1. Internacia Konkurso de Klasika Soldanco en Varsovio.*

En junio 1933 okazis en la ĉefurbo de Polujo La I. Internacia Konkurso de Klasika Soldanco, organizita de la revuo „Muzyka“ („Muziko“), kies redaktoro estas Mateusz Gliński. La konkurso promesis esti vere impona kaj vekis grandan intereson en la publiko. Partoprenis ĝin 126 personoj el 20 landoj.

Mi estis tre kontenta, kiam dank' al mia ĵurnalista karto mi ricevis enirbileton por la konkurso, kaj mi ĝuis efektive grandan plezuron, observante la artistojn, el kiuj multaj faris neforgeseblan impreson al ni.

Bone restis en mia memoro la belega „Danco kun basto.eto“ de Rosalia Chladek, grandioza „Salome“ kaj plena de ĉarmo „Geamantoj en festa vespero“ de Ruth Screl Abramowicz, „Japana balado“ kaj „Krio“ de Paŭla Nireńska.

Ravis nin ĉiujn Rolf Arco per „Ĉasisto“ kaj „Gaja paŝtisto“, Etta Szász per tre bela Brahms-valso kaj interesaj parodioj, Olga Sławska per interpretoj de Chopin, Fedro Marja per „Patrino“ kaj „Frenezulino“, Georg Grcke per grandioza tekniko.

Grandajn kapablojn evidentiĝis ĉe Hildebrandt Marcela, kies manovroj vekis intereson en la publiko, kaj ĉe Ethel Nagy, subtila, lirika dancistino. Tre interesaj estis ekzotikaj dancoj de Lei Niako (Teheran) kaj java nacia danco de artistoj el Java: Raden Mac Jodjana kaj Rcemahlaiselan.

Multaj infanoj partoprenis ankaŭ la konkurson, el ili tamen plej bone plaĉis nur tri varsovianinoj; Hania Lebedowicz, Cesia Fijewska kaj Luba Szapiro, -lernantinoj de Tacjana Wysocka.

Kun granda streĉo ni atendis, al kiu estos aljuĝitaj la premioj, kaj fine la jury, kies tasko estis efektive tre malfacila, kaj kiun eniris: Rolf de Maré, Carlotta Zambelli, Valeria Kratina, Gertruda Bodenwieser, Maks Terpis, Zofja Stryjeńska, Jan Ciepliński, Jerzy Trojanowski, Jan Maklakiewicz, Wincenty Drabik k. a. — decidis jene:

la I premion de la Prezidento de Pola Respubliko (3.000 zł.) ricevis Ruth Sorel Abramowicz, la II premion de Ministerio de Eksterlandaj Aferoj (2.000 zł.) — Rosalia Chladek el Praga, La III premion de Klecministerio (1.500 zł.) — Rolf Arco el Berlino, la IV premion de la Prezidento de Varsovio (500 zł.) — Aleksander Swain el Berlino.

Orajn medalojn oni aljuĝis al Olga Sławska (Varsovio) kaj Georg Groke (Berlino).

Argentaj medaloj estis donitaj al Marja Fedro (polino el Vieno), Paŭla Nireńska (Varsovio), Simone Binois (Parizo). Bronzajn medalojn oni donis al Lilli Sandberg (Breslaŭ), Gerda Kretschmar kaj Doering Afrika (Berlino).

Krome diplomojn oni donis al Jadwiga Hryniewiecka (Varsovio), Thusnelda Walter (Zürich), Marcela Hildebrandt (Poznań), Lilla Baŭer (Budapest) ktp.

El infanoj la I-an premion ricevis Luba Szapiro (Varsovio), poste sekvis Ewunia Kołogórska (Krakovo), Cesia Fijewska (Varsovio) ktp.

Kiel Esperantistino mi volus menci, ke inter la partoprenintoj de la konkurso troviĝis hungara samideano, Etta Szász el Budapeŝto. Ĉarma, aminda knabino kaj tre kapabla kiel dancistino. Estis vera ĝuo observi ŝin dum dancado, ĉar oni vidis, ke ŝi bone kaj profunde sentas kaj komprenas tion, kion ŝi dancas.

**Halina Vinstin.**

Varsovio, en julio 1933.

## KIEL MI-NUŜKA ESPERANTISTINIĜIS?

1920. Mia viena amikino Marie Kramer turmentas min kun fervora intenco. „Lernu Esperanton“, kaj klarigas: „Rigardu, Minuŝka: La hundo = Der Hund. La hundino = Die Hündin.

Kiel sunklara afero! Minuŝka tamen malatentas.

1921. Komerclernejo Fraünerwerb-Verein.

Kamaradino Langenberger apud mi sidanta, deklaras fervore Esperanton kiel multvaloran kaj ĉefe monon donantan aferon, ŝiaj blondaj haroj flugas, ŝia vizaĝeto ardas. Ŝi montras monon de diversaj siaj korespondemuloj, kiuj subtenas la verdan stelon kaj... ŝiro per multe da... vi jam scias. Nur jes, la mono allogas, sed kion fari kontraŭ inerteco de Minuŝka?

1925. Sunklara somera tago. Miaj bruna; okuloj trarigardas la gazeton kaj jen, sankta ĉielo!

**Universitata kurso de Esp. gvidata de Dro Pfeffer!**

Vivu la mondo! Vivu la gazeto, kiu represigis mondekskuantan aferon!

Minuŝka ardas, flamas, ŝvebas en pli altaj sferoj.

Timeme, kun delikata voĉo, ŝi demandas telefone la universitaton, ĉu vere, ĉu eble ankoraŭ aliĝi, por akiri la ĉielan beatecon?

Kaj ŝi marŝas, ŝi agadas, laboradas, sur rozkoloraj nuboj ŝvebanta. Krias la ĉefo, kiu retiras ŝin sur fortan bazon de nia reala mondo. Konkludas la firmao Frankfurter Bejdl: fraŭlino Mantel perdis la prudenton! Niaj fakturoj, niaj klientoj!

Alvenas la tago. La frenezigita fraŭlino kontoristino kuras, kuregas al la sanktaj haloj. Suprenrampas la ŝtuparon, al ĉielo de l' prudento gvidantaj, stum-bletas, faletas en profunda adoro.

Jen la salono, jen la komenco.

Certe nun venas la **blankbarba, dignoplana doktoro...** kiel li nur nomiĝas? **Jes, Dr. Pfeffer,** kiu encerbigos al la streĉaŭskultanta **Minuŝka ĝin, Esperanton.**

Loko? Kie sidi? Apud mi en unua vico tri knabinoj. Bone!

Kontente mi ekgruntetas. Rigardas antaŭen, malantaŭen, dekstren maldekstren. La ludo povas komenci.

Jen. Eniras sinjoro, **juna, bela, plaĉinda!** Ekparolas, alparolas.

Ardas miaj oreloj, nubigas miaj okuloj.

Aha. Bone! Bona komenco.

Nun venos la **blanka barbo.** Li, la dignoplana Dr. Pfeffer.

Paŭzo. Nu, rapide! Rapide! Kie estas la **blanka barbo?** Mi forte enamiĝis je la blanka barbo, kiu neniel volas aperi en la salonego.

Mi freneĝizos. Niaj oreloj aŭdas, ke iu vokas „sinjoro Doktoro“. Mi perdas la okulojn. Volas krii: „mia blanka barbo“, sed 2 belaj viraj okuloj rigardas al unua vico, kie 3 knabinaj rozoj sen dornoj! sidas, flama ekkompreno — li estas, kaj la blanka barbo perdas ĉiun intereson.

Dum la kursdaŭro plej malatentema estas mi - nuŝka.

Sin interesas la pudro kaj lipkolorigilo de fraŭlino Thea K. kiu poste fariĝis amikino ŝia. Mi-nuŝka plibeligas sin kaj malbeligas la ĉirkaŭaĵon streĉe atenteman, dum la prelego de la ĉarma (bedaŭrindo sen blanka barbo) Dr. Pfeffer.

La preleganto kaj instruanto perdas iom post iom la esperon, ke la saltema, babilema, petolema, en unua vico sidanta rozo, iam finkomprenos la kvinpintan ideon.

**Unua vizito de klubo „Danubio“ kun Thea K.**

Boris Beskin, nia rusa adoranto, tentas nin al la vizito de la plej bela viena klubo. Ni fiere eniras kaj singultante forlasas la lokon de l' paco kaj amo. Nia koro perdiĝis je pliagha barba sinjoro kaj post ravita rigardo, ho ve, jen la edzringo! Ne valoras lerni Esperanton!

Sed la verda afereto plantis jam intereson en mia koro.

Denova klubvizitado kaj plena okupado de ĉiuj ĉeestantoj per la saĝa averto „mi estas komencantino, mi ne komprenas Esperanton“. Fiera mi estas pri la heroa decido. Sed en la granda afero ekdoloris la streĉita peco da kapenhavo. Ni cerbumadis, kiel diri „Kopfschmerzen“.

Ĉar, krom „mi estas komencantino, mi ne komprenas esp.“; ankoraŭ ne-esploritaj regionoj estis en mia vortrezoro. Kaj fiere kiel siatempe Edison dum la ekflamo de unua elektra ampolo, mi diris laŭte:

„Mi havas kaprodolorojn“.

Bone, se Minuŝka montriĝas kiel vera kaprino. Ĉar la kapo strikis.

Sed ankaŭ mi diferencigis iom post iom „kion oni devas, kaj kion oni povas“...

Bela, ĉarma, verda steleto estu gvidanto mia sur vojo antaŭeniranta! Vin mi adoras kiel sanktan aferon, estas kaj restos reprezentantino de la **granda heroa ideo de nia altsatata majstro Zamenhof!**

**Minuŝka Mantel, Lwów.**

## **BILANCO DE AJAYI - PRELEGVOJAĜO TRA POLUJO.**

Jam nia negro-samideano Kola Ajayi (prononcu: Aĝaji) ne plu estas inter ni, jam li trakuris en venka marŝo Ĉeĥoslovakion, jam li estas en Jugoslavio, kie li diligente prelegas kaj propagandas por nia afero. Estas do urĝa tempo por fari bilancon de lia vojaĝo tra Polujo kaj por ankoraŭfoje sisteme kunmeti liston de liaj prelegoj en nia lando.

La prelegoj okazis en Polujo ĉefe en la kadro de 3 prelegcikloj, el kiuj ĉiu daŭris 15 tagojn kaj el kiuj la unua estis organizita de la Akademia Esperan-



DR JERZY DOBRZYCKI.

## WIT STWOSZ.

RADIOPRELEGO TRADUKITA ESPERANTEN KAJ AŬDIGITA EN KRAKOW,  
WARSZAWA KAJ ALIAJ POLAJ STACIOJ DE TADEUSZ HODAKOWSKI LA 8.III. 1933  
OKAZE DE 400-JARA MORTOTAGA DATREVENO DE LA GENIA SKULPTISTO.

Sur larĝa kaj pereanta en krepusko de jarcentoj vojo, kiun ĉiame marŝas antaŭen en senlaca iro disvolva la homa spirito, aperas de temp' al tempo esceptaj individuoj, superkreskantaj la kapojn de milionaj aroj. Dank'



Preĝejo de S-ta Mario en Kraków.

al superaj kaj neesplorableblaj por homa menso antaŭdestinoj tiuj personoj fariĝas jen konigantoj de grandaj ideoj, jen malkovrantoj de novaj revoluciaj reguloj de scienco aŭ, fine, plej intime ensekretigitaj pastroj ĉe granda misterio de l'arto. Ili precipe ofte aperas en epokfaraj periodoj, tie, kie kontraŭpuŝiĝas du mondkonceptoj, el kiuj unu kvazaŭ velkinta, seka foliaro devas cedi al alia, kiu jam ekiĝas per junaj, verdaj burĝonoj de novaj ideoj. La partopreno de tiuj geniaj individuoj estas, ke ili staras preter la tempo, akiraĵoj de ilia spirito neniam maljuniĝas, kaj la starigitajn de ili verkojn, kiel tion diris jam la antikvaj poetoj, pli daŭrajn ol la bronzo, eĉ la manĝema tempo mem venki ne sukcesos.


Kaj kiam laŭvice ni direktos nin en nian polan pasintecon, la vido tuj ekhaltos sur periodo de mezepoka vesperiĝo, de finkliniĝo de skolastikaj ide-

aloj en vivo kaj kulturo, idealoj de gotiko en arto, post kiuj jam baldaŭ triumfe bonvenos humanismo kaj renesanco. Kaj jen super la aroj ni ekvidos du personojn grandegajn, pli daŭrajn ol la bronzo, pli potencajn ol la tempo. Ili estas Nikolao Kopernik kaj Wit Stwosz. Du plej geniaj homoj, kiuj vivis sur la pola tero. La unua el ili — jen revolucia pioniro de novaj vojoj en ekzaktaj sciencoj, al la suno mem kaj al steloj novajn cirkulojn signanta. La alia — jen la nekomparebla ĉefmajstro en sfero de plastikaj artoj, estranta memstare kaj reĝe en regiono de l' belo, tiu plej nobla ornamo sur grizaj vojoj de homa vivo.

Pri Stwosz mi volas hodiaŭ paroli, do mi petas vin, karaj aŭskultantoj,

bonvolu turni viajn pensojn al la malnova reĝa Krakovo, al nigriĝintaj de multcentjara antikveco turoj de Sankt-Maria preĝejo, al estiminda Wawel-kastelo, ĉar en tiu urbo pasigis Wit Stwosz unuan kaj feliĉan duonon de sia longa vivo, en tiu urbo lia potenca spirito esprimiĝis plej mature kaj plej forte en aro da restintaj ĝis nun ĉefverkoj de lia skulptilo. Cetere al tiu urbo direktiĝos nunjare okuloj de l' tuta kultura mondo, ĉar ĉijare pasas kvarcento da jaroj depost la morto de Wit Stwosz, okazinta en 1533 kaj ree fariĝos aktualaj liaj vortoj, kiujn tiutempe oni skribis pri li en Kraków, ke „lia saĝo kaj verkoj estas laŭde famaj en la tuta kristana mondo“.

Do transportinte nin per pensoj inter antikvajn murojn de Krakovo ni prikonsideru mallonge la vivkuron de l' genia majstro kaj kialojn de lia grandeco. Se temas pri lia vivo, ĝi, bedaŭrinde, kaŝas hodiaŭ antaŭ niaj okuloj multajn sekretojn kaj enigmojn, kiuj eble neniam estos solvitaj. La bildon de tiu vivo ni devas reprodukti el informeroj, etaj mencioj, restintaj en antikvaj arkivoj de Krakovo kaj Nürnberg. Eĉ la dato de lia naskiĝo kaj la loko, kie li ekvidis la tagan lumon, ne estas ĝis nun konataj. Kiam li mortis en 1533 jaro oni notis, ke li estis 95-jara — do li estus naskiĝinta en 1438 j. Ĉu li naskiĝis en Krakovo aŭ Nürnberg, kie li pasigis la duan duonon de sia vivo, ne estas ĝis nun konstatite. Ne estas ankaŭ tute neeble, ke li devenis el loĝloko Harro en Sepkastellando, kie naskiĝis lia frato Mateo, poste translokiĝinta al Kraków kiel juvelisto. La germanaj esploristoj defendantaj lian germanan kaj Nürnberg'an devenon sukcesis ĝis nun per neniam certaj atestoj tion pruvi. El polaj historiistoj prof. Ptaśnik, kiu plej profunde penetris al polaj kaj germanaj fontoj, prezentis aron da pruvoj, ke Stwosz Nürnbergano ne estis, ke li prefere en Kraków naskiĝis, kaj ĉiukaze ĉi tie li restadis de sia junaĝo. La familio de Stwosz'oj aŭ Stosz'oj estis laŭ opinio de prof. Ptaśnik de pola deveno, kaj ĝia nesto estis la Piast'a Silezio; tiu nomo tre disvastigita sur teritorio de mezepoka Pollando kaj precipe de Silezio estas deveninta el etigita formo de la nomoj Stanisław aŭ Stosław. El Silezio disiradis anoj de tiu familio en diversaj tempoj al Kraków kaj Nürnberg, al Grand-Polujo, Bohemujo kaj Moravio, al Spiż kaj Sepkastellando. Ĉu la granda krakova majstro mem estis polo kaj ĉu li konsideris sin polo? Ankaŭ tio ne estas konstatita, sed estas tute certe, ke ekde sia frua infaneco li restadis en Kraków. La unua edzino de Stwosz estis polino, kaj la filoj ricevas nomojn de krakovaj patronoj. Unu el ili Stanislao estis poste eminenta skulptisto kaj juvelisto, heredanto de l' patra laborejo. Plue estas frapa la fakto, ke Wit Stwosz tre malbone parolis germane. Tio estas klare videbla el leteroj kaj dokumentoj de li skribitaj; la lingvaĵo estas plena de grandaj eraroj, prefere malbonigita ĵargono, ne memoriganta la tiamajn dialektojn; ĝi ŝajnas esti lingvaĵo de fremdulo, kiu pene proprigis al si la germanan parolon. Estas konate, ke Stwosz, translokiĝinte al Nürnberg, longe estis nomata



La altaro de Wit Swosz en St-Maria preĝejo en Kraków.

polo, uzis polajn kostumojn kaj observis polajn kutimojn. Tamen ne refuteblajn pruvojn, al kiu nacio li apartenis ni ne posedas kaj — povas esti — pro manko de skribaj fontoj ni neniam ilin posedos. Kvankam absoluta difino de nacieco de Stwosz germane aŭ pole sendube kontentigus la ambiciojn de tiu aŭ alia popolo, sed tamen la afero en sia kerno estas indiferenta. La vere granda arto, naskiĝanta sur ĉielatingaj altaĵoj laŭsajne neteraj — ĉesas esti propraĵo de unu popolo kaj fariĝas komuna bono de la tuta homaro.

La krakova altaro en Sankt-Maria preĝejo ĝuste inter tiuj bonaĵoj estas vicigata. Kaj eĉ se la afero neniam estus klarigita, eĉ se estus pruvite, ke Stwosz ne estis, polo, tamen ĉiam ĝi estos titolo por nia fiero, ke en nia krakova medio, sur nia pola tero, la polan aeron spirante kaj manĝante la polan panon, vivis inter ni artisto de tiom sublimaj flugoj kaj inter ni li kreis la plej grandan el siaj verkoj.



Kiel ĉiu granda artisto estis Stwosz en sfero de artverkado detruinto de eluzitaj konvenecoj, enmetadis en siajn verkojn videblajn erojn de sia koro, temperamento kaj karaktero, akordigante sin per tio kun la trajtoj karakterizaj por nia nacio. De tie devenas tiu frapa aparteco de lia verkaro for de l' arto kaj karaktero germanaj, pri kio jam rimarkigis la germanaj esploristoj Vischer kaj Daun, el kiuj la lasta skribis: li estas majstro, ĉe kiu oni ne rimarkas karakterizajn trajtojn proprajn al la germana nacio; varma pasio kaj maltrankvila nervozeco de tiu artisto estas la ecoj prefere propraj al poloj aŭ francoj.

Do la naskiĝloko de Stwosz ne estas konata, ankaŭ ne estas sciata kie kaj ĉe kiu li studis, ĉu li faris la kutimajn tiutempe artistajn migradojn kaj kien. Laŭ la plej novaj esploroj ŝajnas esti ne dubeble, ke li tiajn migradojn faris kaj eĉ malproksimajn, ĉar certaj karakterizaĵoj rezultantaj el analizo de liaj verkoj ŝajnas montri senperan kontaktiĝon kun la nederlanda arto. La unua certa dato de lia vivo estas la jaro 1474, kiam li sian filon Stanislaon lokas en la metiejo de juvelisto Wojtek. Do li devis jam sufiĉe longe restadi en Kraków, kiam li sian filon ĉi tie naskitan kaj minimume dekjaran lernigis ĉe la juvelisto. Poste li forveturis por kelka tempo al Nürnberg, restigante sian familion en Kraków, sed li revenis al Kraków en jaro 1477, rifuzante en Nürnberg la akiritan intertempe civitanecon. La kaŭzo de tiu reveno estis sendube la invito por komenci laboron ĉe la granda verko, altaro de la ĉefpreĝejo en la urbo. Stwosz, al kiu oni komisiis tiel gravan verkon, estis sendube artisto eminenta kaj rekonita.

Tiu altaro fariĝis la ĉefa vivverko de l'artisto. Li enmetis en ĝin la tutan grandegan skalon de siaj teknikaj rimedoj, vivigis per senekzempla potenco de siaj plej profundaj elementaj inspiroj. En daŭro de dekdujara laboro ekestis la altaro, kiun ne havis ĝis nun Polujo kaj Eŭropo. Ĝi estas kolosa triptiko el tilia ligno, okupanta la tutan larĝon de alta gotika presbiterio. Ĝi konsistas el predelo, tio estas mallarĝa parto starigita sur menzo (tablo de l' altaro), el kolosa meza ŝranko entenanta la ĉefan scenon en plena skulpto, el du moveblaj aloj kovritaj ambaŭflanke per bareliefoj kaj du ne moveblaj aloj sur flankoj de l' ŝranko, ankaŭ ornamitaj per bareliefoj, krome supre super la ŝranko videblas altencelanta finaĵo en formo de grupo sub gotika baldakeno kaj du figuroj de sanktuloj.

Entute la alto de la altaro estas 13 metra. La tuta altaro kun ĉiuj arkitekturaj kaj figuraj partoj estas kovrita per riĉega kolora polihromio kaj riĉe orumita. La enhavo de l' skulptaĵoj estas scenoj el vivo de Sankta Mario kaj Krista turmento. En la predelo ni vidas transparente la skulptitan arbon de Jesse. Sur bareliefoj, kiuj en nombro de 18 kovras la alojn, oni devas admiri senkomparajn multfigurajn scenojn el la vivo de Mario kaj Jezuo. Disvolviĝas antaŭ niaj okuloj grandega skalo de tipoj, de noblaj staturaj de Kristo kaj sanktaj viroj, idealigitaj figuroj de virinoj, subrigarditaj

laŭ naturo instruituloj kaj pastroj — ĝis signitaj per malbeleco kaj malsanoj ekzekutistoj. De kvieta agordo de genraj scenoj de Naskiĝo de S-ta Mario aŭ de apero de Savinto al Mario Magdaleno en silentema florplena ĝardeno — ĝis la angoro pro malsupreniro al infero, plenigita de teruregaj demonoj, korŝira dramo de Kristo kaj Lia morto sur kruco. Estas tie videblaj internoj de gotikaj ĉambroj kun ĉiaj antikvaj mebloj kaj plankoj el ornamriĉaj, samkiel vastaj, montplenaj kaj arboriĉaj pejzaĝoj kun skulptitaj aŭ pentritaj urboj, kasteloj, preĝejoj. Dum tutaj horoj kaj tagoj oni povas rigardadi tiujn skulptaĵojn kaj ĉiam pli novajn belaĵojn malkovri en ili.

Tamen la plej potenca supro de genia verko de Stwosz fariĝis la meza scena de l' triptiko. Ĝian fablon la majstro ĉerpis el la Ora Legendo de Jakobo de Voragine la amata legaĵo de mezepokaj artistoj, estanta la ĉarma floro de franciskana literaturo. Unu el epizodoj de tiu verko rakontas, ke al Mario, loĝanta en soleca hejmo, ĉe piedoj de monto Sion, aperis iutage anĝelo kun palma branĉeto kaj anoncis al ŝi la proksimiĝantan horon de l' morto. Humile ŝi subigis sin al la dia volo, kaj en la preĝoj varmegaj ŝi elpetis tri favorojn: ke Kristo ĉeestos ŝian morton, ke venos ankaŭ apostoloj predikantaj en la mondo kaj ke satanon ŝi ne vidos. Inter fulmoj kaj tondroj sur dorsoj de nuboj venis por unu tago la apostoloj kaj cirkaŭis Dipatrinon. Kaj kiam ili tiel daŭris en komunaj preĝoj je la tria horo nokte ekstremis la tero, agrabla odoro disiĝis cirkaŭe, aperis Kristo cirkaŭita de sanktularo, kaj en tiu momento la animo de Mario apartiĝis de la korpo, la Savinto cirkaŭbrakis ŝin senteme kaj priŝutitan de rozoj kaj lilioj portis al la ĉielo.

Tiun ĝuste legendon pri la morto de Dipatrino prezentis Stwosz en la meza sceno. Nenio priskribos la potencon de l' impresoj, kiun ĝi elvokas. Vere ne multaj artistoj sur la vasta spaco de jarcentoj atingis tian altecon ĉe transversado de siaj inspiroj en materialon. Jen kvazaŭ sur alta sceno ludiĝas antaŭ la ravita okulo ia antaŭjarcenta misterio. En festa koncentriĝo dekduo da apostoloj je superhoma grandeco cirkaŭis Marion, kiu estas prezentita kiel juna netere bela virgulino, ŝi senforte kliniĝas enmeze, mallevante la kapon kaj la kunmetitajn manojn al-tere. Subtenas ŝin barbohava apostolo S-ta Jakobo, apude S-ta Petro kantas psalmojn el malfermita libro, de alia flanko S-ta Johano levas baskon de la mantelo por viŝi la larmojn. Ĉiu kapo prezentas apartan karakteron, ĉiu mano ĉu la mallarĝa delikata de Mario ĉu la ostoriĉa, vejnoŝvela mano de apostolo estas por si mem ĉefverko. Ĉiuj personoj estas volvitaj per longaj manteloj, terenfluantaj en milaj kurbiĝoj kaj faldoj, tiel tipaj por la Stwosza ĉizilo, tiel grava elemento de ludo luma kaj ombra. Sed jen la flankaj personoj levas la kapojn supren — tie super la citita sceno roliĝas la dua akto de vera misterio. Jen en radieca aŭreolo en cirkaŭo de flugaltiĝantaj anĝeloj leviĝas ĉielen Kristo kaj Lia Patrino. Ankoraŭ pli supre jam super la ĉefa ŝranko



en supraĵo de l' altaro fariĝas la tria akto: Kronado de Dipatrino, kiu humile ek genuante, ricevas kronon el manoj de diaj personoj. Flanke ekstaris sub baldakenoj patronoj de la reĝlando S-taj Stanislao kaj Adalberto.

Tiun ĉefverkon finitan en la jaro 1489 akceptis Krakovo kun raviteco. Antaŭ Stwosz malfermiĝis vojoj al riĉeco, honoroj kaj gloro. La urbkonsilantaro dankante liberigis por ĉiam lian domon de impostoj. Profitante liajn ĉiuflankajn kapablojn — ĉar li famiĝis ne nur kiel skulptisto, sed ankaŭ kiel talentplena pentristo, grafikisto, juvelisto, bronzfandisto kaj bonega arkitekto, inĝeniero, konanto de milita arkitekturo kaj de pontoj — oni komisiis al li funkciojn de urbarkitekto, direktanta la konstruajn laborojn en preĝejoj kaj ĝenerale en la urbo. Eknombriĝis mendoj ĉiam pli multaj kaj ĉiam pli honoraj. La plej granda el liaj verkoj preter la altaro estas la sarkofago de l' reĝo Kazimiro Jagelido. Stwosz memorigis ĉi tie al ekzistantaj jam en la preĝejo tri baldakenaj sarkofagoj de reĝoj, elskulptis el ruĝa ŝprucmakulita marmoro tumbon kun grandioza portretita figuro de l' reĝo, ĉirkaŭ la tumbo li elskulptis dramplenajn dolorgestajn figurojn de ploristoj, sur ok kolonoj apogis altencelantan baldakenon kun multaj statuoj, kiu tamen en sia supra parto estas nevidebla. Ok kapitejoj ornamas la kolonojn kun pedante skulptitaj scenoj el sankta Skribo. La sarkofago, kiel tuto estas „eminenta ĉefverko“. Oni devas en ĝi admiri abismajn profundojn de sento kaj ne malpli miregigan virtuozecon teknikan, estradon al la ĉizilo kaj materialo, konscian serĉadon de malfacilaĵoj.

Krom la nomitaj verkoj Kraków kaj Polujo posedas kelkajn aliajn sed ĉi tiuj estas la ĉefaj.

En la j. 1496 Wit Stwosz forlasas Krakovon por ĉiam. Kun kolektita ĉi tie rimarkinda kapitalo li translokiĝas al Nürnberg, kie laŭ kontrakto kun la konsilantaro li estis konstruonta grandajn fortikaĵojn kaj pontojn. Oni promesis al li krom la kutima pago por ĉiu laboro grandegan jaran renton sub kondiĉo ne forlasi Nürnbergon ĝismorte. Tiu forveturo fariĝis por li ĉeno de senĉesa misorto. Tuj en la sama jaro mortas lia edzino, kaj la rea edziĝo implikis lin en dekjaran proceson. La komercisto Jakobo Boner ruze eltrompis de li parton de lia havaĵo, kio kaŭzis al li en j. 1503 katastrofon. Jen volante savi la kontantan monon li falsis la bezonatan dokumenton, poste, malgraŭ la konkordiĝo kun Boner, la konsilantaro volante fari el li subiĝeman sklavon komencas kontraŭ li proceson kaj kondamnas lin je torturoj kaj brulstampo. Kvankam li trovis potencajn protektantojn kaj inter ili la imperiestron Maksimilianon mem, de kiu li ricevis kompletan rehonorigon, sed tio ne finis liajn terurajn ĉagrenojn. Jen post kelka tempo li memorigas la konsilantaron pri la promesita pago kaj rento, kaj la konsilantaro nomanta lin „maltrankvila, perversa kaj kverelema homo“ per enkarcerigo eldevigis de li rezignon de justaj pretendoj. De tiam nur en titana laboro serĉas Stwosz konsolon. Li kreas tiutempe

grandan nombron da verkoj skulptitaj en ligno, ŝtono, marmoro, fandas el bronzo, estas ankaŭ okupita pri pentraj laboroj. Ornamiĝas per ili preĝejoj en Nürnberg, migras al malproksimaj urboj kaj landoj. El tiu periodo indas mencii ŝtonajn skulptaĵojn en la preĝejo de S-ta Sebald en Nürnberg, lignan tabulon rozarian kaj interesan grupon de „maljusta juĝisto“ inter riĉulo (Boner) kaj mizerulo (Stwosz) en Ĝermana Muzeo, plue plenan de nobla patoso „Anĝelan saluton“ en preĝejo de S-ta Laŭrento, altarojn en Schwabach kaj Bamberg, pentraĵojn en Műnnerstadt. La esenco de lia arto ne subiĝas al ŝanĝiĝo, ĝi portas ecojn de malfrua gotiko, malgraŭ la evidenta efikado de influoj de itala renesanco. Tamen neniu el tiuj verkoj atingis tiujn altaĵojn, kiujn la altaro en St-Maria preĝejo kaj la sarkofago de Jagelido.

Ĉirkaŭ la maljuna majstro estas ĉiam pli malĝoje kaj malgaje, la plejproksimuloj unu post alia foriras en transmondon. Li mem havante 93 jarojn ne ellasas el la manoj la skulptilon kaj penikon, nur la blindeco elĵetas ilin de li. Li mortis en 1533 jaro. Kaj sendube antaŭ la okuloj de l' dolorplena maljunulo preterŝoviĝis en la momento de l' morto la bildo de la tuta vivo kaj Kraków, kie li trovadis nur prosperon kaj honorojn, kie oni skribis pri li, ke li estis „mirige solida, diligenta kaj sindona, kies saĝo famas en la tuta mondo“ kaj Nürnberg, kiu per fajro stampis lin kaj anoncis „perversa kaj kverelema“. Ho, kiel fiera povas esti Kraków, ke alie ol Nürnberg ĝi premiis kaj taksis la talenton de l' granda artisto.

Kaj ankoraŭ unu vorto al vi ĉiuj, kiuj min nun aŭskultas. Se vi volas travivi neforgeseblan momenton de ensekretiĝado en la spiriton de la Stwosza verko kaj vi volas senpere ekkoni, en kio konsistas la esenco de lia grandeco — iru dum trankvila suna mateno al la Maria preĝejo, ekstaru en malplena navo sur centkolora tapiŝo, kiun teksis la suno filtriĝanta tra mezepokaj vitraĵoj, levu la fruntojn kaj rigardu la profundiĝantajn en vi okulojn de Apostoloj, streĉu la orelojn je susuro de iliaj vestoj kaj flirtado de anĝelaj flugiloj, kiujn vivigis Stwosz kaj kiujn elsorĉis sur muroj de l' preĝejo Matejko. Kaj ankoraŭ pli alten rigardu, tien al suproj de l' altaro, kie la ĉielo malfermiĝas kaj super la dolĉega Mario flugpendas la krono tenata de la Dia mano... En tia momento io rompiĝos en viaj brustoj kaj ekstremos viaj koroj — kaj vi tiam ekkomprenos, ke en tio konsistas la grandeco de la Stwosza nomo, ke nin, limitajn de liaj tempoj per abismo de jarcentoj, ideoj kaj celadoj — lia verko sukcesas skui kaj kortuŝi.

## PRONONCAJ KAJ FAKAJ KLARIGOJ.

*Wit Stwosz* (prononcu: Vit Stfoŝ), germanoj nomas lin: Veit Stoss.

*Kraków* pr. Krakuv.

*Piast* (pr. Pjast) fondinto de unua reĝa dinastio en Polujo.

*Stanisław* pr. Stanisŭav.

*Stosław* pr. Stosŭav.

*Spiż* (pr. Spij) germane Zips, apudtatra provinco.

*Sepkastellando* (Transilvanio) — provinco de Hungarujo kaj Rumanujo.

*Triptiko* = triparta, ŝrankoforma altaro.

*Presbiterio* = parto de preĝejo, kie troviĝas la granda altaro, apartigita de la cetera parto de preĝejo per balustrado.

*Predelo* = malsupra parto de altaro, kuŝanta sur menzo, kaj estanta apogilo por triptiko.

*Tumbo* = ĉerka kestego.

---

tista Rondo en Varsovio kaj la du sekvantaj de fratoj Fethke en Bydgoszcz. Ĉi sube ni donas mallongan liston de ĉiuj urboj, en kiuj okazis prelegoj.

En Varsovio Ajayi prelegis 9-foje. Tio estas tre rimarkinda sukceso. La prelegoj estis organizitaj de jenaj organizaĵoj: Ż. T. K. (Hebrea Landkonema Societo), judaj ĵurnalistoj, kuracistoj kaj AER, societo „Szklane Domy”, societo KMKA, Związek Kobiet kaj 3 lerneaj prelegoj organizitaj en popollernejoj helpe de lernejestro s-ano Głuchowski. Speciale bone sukcesis la vespero de ŻTK. (unua prelego en Varsovio.) kaj la tri lerneaj, kiuj estis bone vizititaj. Laŭ ĉeestantoj oni povas taksii tiujn prelegojn je ĉ. 1900—2.000 personoj.

En Bydgoszcz okazis 4 prelegoj, el kiuj 3 en tri diversaj Esperanto-grupoj, la kvara en Komerca Liceo. Pro diversaj kaŭzoj publikan (grandstilan) vesperon kun Ajayi oni ne aranĝis. Ĉefe oni timis, ke li ne plu estas „atrakcio” por la Bydgoszcza publiko, des pli ke dum unujara restado en Bydgoszcz li ofte dum Esperantaj publikaj vesperoj ludis kiel aktoro, paroladis pri diversaj temoj, kaj kantis afrikajn (aŭ ankaŭ modernajn) kantojn.

En Białystok okazis 3 prelegoj, el kiuj 2 estis organizitaj de la loka Esperanto - societo.

En Krakovo same okazis 3 prelegoj, el kiuj 1 estis publika kaj 2 lerneaj —ĉiuj bonsukcesaj. Plurfoje artikoloj pri Ajayi en IKC.

En Chełmno okazis 1 prelego en kadeta lernejo (kie oni oficiale instruas Esperanton) antaŭ 300 personoj kaj 1 publika.

En Wilno okazis 1 publika kaj 1 lerneja prelegoj.

En Kartuzy okazis 2 bonege sukcesintaj prelegoj (gimnazia kaj publika) kun kune ĉ. 400 personoj. Aranĝis kaj tradukadis nia malnova pioniro, gimnazia direktoro s-ano Orzech.

En Mława s-oj D-ro Czubryński kaj Sakowicz aranĝis du lerneajn prelegojn, kiuj ambaŭ bele sukcesis. Ĉ. 700 ĉeestantoj kune.

En Płock okazis prelego antaŭ 500 personoj en tiea Mariavita monaĥejo, kie oni tre varme kaj sincere akceptis s-on Ajayi, kaj publika prelego en urba teatro.

En Włocławek okazis unu publika kaj unu lerneja prelegoj en plej granda kinejo. Bona sukceso. Unufoje pli vasta propagando en tiu urbo.

En Czerków okazis publika kaj lerneja prelegoj kun ĉ. 450 personoj kune.

En Lwów okazis publika prelego kun ĉ. 250 personoj kaj lerneja kun ĉ. 230 personoj. Ambaŭ sukcesis bonege. Ĉefa organizanto: nia fervora s-ano Zb. Zieliński.

En Nowogródek okazis lerneja prelego.

En Poznań en la Esperanto-klubo interna prelego antaŭ ĉ. 60 personoj.

En Szamotuły prelegon publikan organizis nia malnova samideano Maske.

En Sompolno okazis publika prelego.

En Katowice okazis publika prelego antaŭ ĉ. 250 personoj. La prelego senpere estis tradukata en polan kaj germanan lingvojn.

En Chojnice la tre juna Esperanto-rondo aranĝis publikan prelegon.

En Tarnów diligente kaj tre bele organizis publikan prelegon nia fervora s-anino Traumówna. I. a. grandaj tolrubandoj kun propaganda teksto pendantaj super la stratoj atentigis la publikon pri Ajayi.

En Sosnowiec okazis publika prelego.

En Lublin dum lastjara pola kongreso okazis publika vespero de afrikaj kantoj. (Ĉar la lokaj samideanoj ne prizorgis lumbildaparaton, Ajayi rezignis pri prelego kaj nur mallonge parolinte pri afrika muziko kantis vicon de afrikaj polkantoj).

En Pola Radio tra ĉiuj stacioj s-ano Ajayi kantis de Varsovio afrikajn kantojn (ĉ. 15 minutojn). Esperantlingva anonco kaj pri-Esperanta mencio en pola lingvo. Certe la plej grava aranĝo dum la tuta vojaĝo.

Entute Ajayi en 22 urboj havis 45 prelegojn, kiujn ĉeestis ĉ. 8100 personoj, krome 1 Radio-prezentadon tra ĉiuj polaj stacioj.

Volante prijuĝi, ĉu tiu sukceso estas granda aŭ malgranda, ni plej bone komparu ĝin kun la prelegvojaĝo de nia hinda samideano Sinha, kiu ja tute simile

traveturis kun prelegoj nian landon. Ni do trovas jenajn ciferojn: Sinha paroladis same en 22 urboj de Polujo, sed havis nur 40 paroladojn (Ajayi 45) kun ĉ. 8000 aŭskultantoj (Ajayi ĉ. 8100 pers.) kaj 1 Radio-prezentadon tra Wilno (Ajayi tra ĉiuj 7 polaj stacioj). Kun ĝojo ni do povas konstati, ke Ajayi ne nur atingis la ciferojn de Sinha, sed eĉ superis ilin. Tio estas grandega sukceso, se oni pripensas, ke la ekncmia krizo nuntempe estas multe pli akra ol en 1931, kiam prelegis Sinha.

Ni povas aserti, ke Kola Ajayi rompis — malgraŭ malfavoraj cirkonstancj — la prelegrekordon de la hindo Sinha en Polujo! —

Ĉie oni tre timis la malbonan situacion en nia lando. Multa energio estis bezonata flanke de la organizantoj por konvinki la skeptikajn samideanojn en Polujo, ke bone organizita Ajayi-vespero ĉiam kovras la elspezojn. Kelkaj urboj dum longaj semajnoj interkorespondadis kun la aranĝantoj por fine inviti Ajayi aŭ rezigni. Kelkaj urboj ankoraŭ pripensadas...

Estas ankaŭ interese kompari la vojagon de Sinha kun tiu de Ajayi laŭ siaj detaloj. Jen ni trovas, ke same kiel de Ajayi ankaŭ de Sinha en Varsovio okazis 9 prelegoj. La grandaj Esperanto-centroj kiel Kraków, Łódź, Białystok, Lwów, Wilno kaj Bydgoszcz restis ĉiuj aktivaj, kaj same aranĝis prelegojn de Ajayi kiel de Sinha. Sian „pozicion“ plue tenis Chełmno, Sosnowiec, Tarnów, Lublin kaj Nowogródek, kie oni same kuraĝis aranĝi Sinha — kaj Ajayi-prelegojn. Do tiel kvazaŭ la movado en 12 urboj restis samvigla depost 1931.

Al tiuj urboj nun aliĝis pluaj 10 urboj, kiuj ne aranĝinte Sinha-prelegon, aranĝis — parte kun bonega sukceso — Ajayi-prelegon. Unuavice ni citu Poznań, „la perditan filon“, kie feliĉe la movado dank' al energia laboro de s-ano D-ro Śluzar revekigis en lasta jaro kaj nun ree normale funkcias. Plue Katowice, kie oni siatempe hezitis aranĝi Sinha-prelegon, kaj kie oni nun pri la Ajayi-vespero estas plene kontenta. Plue Płock, kie tamen la movado vivas preskaŭ ekskluzive en la muroj de la mariavita monaĥejo. Grave ankaŭ estas, ke en Włocławek junaj samideanoj unuafoje provis propagandi grandskale dezirante samtempe starigi la movadon sur larĝan bazon. Ni citu plue Czortków kaj jenajn novajn „Esperanto-urbojn“: Kartuzy, Chojnice, Sompolno, en kiuj tri urboj estas tute junaj Esperanto-grupoj, krome Szamotuły kaj Mława, kie ni havas izolulojn.

Kaj nun ni rigardu la alian flankon: kiuj 10 urboj aranĝintaj Sinha prelegon ne aranĝis Ajayi-prelegon? Jen antaŭ ĉio ni vidas Toruń, en kiu okazis la plej bone vizitita Sinha-vespero kun 600 personoj (en urba teatro). Bedaŭrinde kun forigo de s-ano Rozmarynowski la movado en Toruń tute mortis kaj malgraŭ konstanta klopodado de Bydgoszcz ŝajne ne estas provizore revivigebla. El la pli konataj Esperanto-urboj ni citu ankoraŭ Królewska Huta, kiu, malgraŭ ke la movado tie ne dormas, pri Ajayi-vespero ne klopodis. La aliaj urboj estas malpli konataj, pri ili oni malmulton, parte eĉ nenion aŭdas kaj verŝajne la movado en la plimulto de tiuj urboj estas malvigla aŭ dormas. Ili estas: Grodzisk, Ostrołęka, Dąbrowa Górnicza, Baranowicze (ĉu s-ano Gelfand timis la krizon?), Łuck, Krzemieniec, Nieśwież kaj Knurów.

Por kompletigo ni devas aldoni, ke en la kadro de la pollanda vojaĝo Ajayi ankaŭ transpaŝis por du tagoj la ĉefan limon kaj havis 2 prelegojn en Karwina (kie oni tradukis pollingven) kaj 1 prelegon en Moravska Ostrava (tradukatan ĉeflingven). Tiuj 3 prelegoj havis speciale grandan sukceson kaj estis vizititaj de preskaŭ 2000 personoj kune (aranĝinto: nia pola samideano Kobiela en Mor. Ostrava).

Tia estas la bilanco de la Ajayi-prelegvojaĝo tra Polujo. Certe granda kolektiva fortostreĉo, kies fruktoj restas senteblaj dum pli longa tempo. Nia movado bezonas de tempo al tempo tian aŭ similan okazon por streĉi la fortojn kaj je unu sama tempo ataki la publikan opinion en Polujo.

Ni esperu, ke ne pli malfrue ol post du jaroj ni ree havos okazon gastigi en nia lando ekzotikan Esperantiston prelegvojaĝantan, kiu rompos la belan prelegrekordon de nia negro-samideano Kola Ajayi.

**Edmund Fethke.**



## MALLONGA RESPONDO AL ŜATINDA RECENZINTO.

La julia numero de „Pola Esperantisto” 1933 honoris min per entuziasma pritakso de mia lasta traduko „Merkado la azenpelisto”.

La ŝatinda recenzinto, s-ano Dro L. Dreher, bonvolis dediĉi multe da atento al mia traduko kaj eldiris sian opinion koncerne al kelkaj esprimoj, kiuj ŝajnas al Li iom riproĉindaj. Mi dankas la recenzinton pro la serioza kaj atenta tralego de la verko kaj permesas al mi refuti la riproĉetojn.

Do, laŭorde: „kun kuro de l'tempo” — ke la verbo „kuri” koncernas ankaŭ la tempon, pruvas la esprimo „en la kuranta monato” ks. „Pro timo antaŭ la rabistoj” — „timo antaŭ” estas Zamenhofa esprimo, sam kiel „timo pro” — ĉi tie estas preferinda „timo antaŭ” por eviti ripeton de l' vorto „pro”.

La vorto „difuzi” estas Zamenhofa kaj uzata, kiam temas pri gaso, varmo ks.

„Urgi” estas nepre transitiva laŭ Zamenhofa uzo.

„Esti en stato” estas internacie komprenebla, do — korekta, kiel la ŝatinda recenzinto mem konfesis.

Longa — długi, laŭlonga — podłużny.

„Profundaĝa” estas klasika Zamenhofaĵo, ofte troviĝanta en la Biblio.

„Flugilo” estas en Esp. kiel en aliaj europaj lingvoj dusenca.

„Atribui” signifas interalie: doni; destini ion al iu, do „atribui al iu parton de la kapitalo” estas tute korekta.

„Imagi”-fantazii — estas korekte uzita en mia traduko. „Strebi” estas Zamenhofaĵo. „Legitimajo” estas same bona kiel „legitimilo”. La vorto „devontigi sin” kiu tiom plaĉas al la ŝat. recenzinto ne estas mia eltrovaĵo, ĝi estas pure Zamenhofa kaj troviĝas en la traduko „Batalo de l' Vivo” de Dickens, — „li timis devontigi sin al pagado de grandaj sumo”.

Mi refoje dankas la recenzinton pro la atenta pristudo de mia lasta traduko. Mi esperas, ke miaj supre cititaj klarigoj konvinkos Lin komplete. Ili estas ja Zamenhofaj esprimoj, do senriproĉaj.

Se mi povus esti certa, ke en nia Esperantolando troviĝas multe da seriozaj legantoj, kia montriĝis la ŝatata recenzinto, s-ano Dro L. Dreher, mi pliigus sendube mian literaturan agadon por Esperanto.

Leono Vienano.

Varsovio, 15. VII. 1933.



## F I L M O



### INTERNACIAJ FILMOJ.

La arto estas internacia. Tial ankaŭ la filmo, se ĝi nun prezentas arton, estas ankaŭ internacia.

Tamen sub tiu nomo oni povas kompreni ankaŭ ion alian: nome manieron de la teknika ekesto de iu filmo. Se nome kelkaj nacioj kunlabras en iu filmo, oni povas nomi ankaŭ ĝin internacia.

Tiu kunlaboro prezentiĝas tre ofte nur tiel, ke en filmo de unu nacio partoprenas eksterlandaj artistoj.

El polaj artistoj, kiuj laboras eksterlande plej famaj estas: Pola Negri kaj Jan Kiepura. Sed ankaŭ en polaj filmoj ludis fremdaj artistoj. Mi citas nur pli gravajn. Ankoraŭ en la epoko de „muta” filmo, ludis kure kun Pola Negri en „Nigra Libro”, dramo de la produktejo „Sfinks” tiel poste populara Harry Liedtke. En „Uragano”, kiun reĝisoris Józef Lejtes, ludis viena filmstelo el film-produktejo „Sascha” — Renata Renee. Por la filmo „Kulto de la korpo” dungis Michał Waszyński, unu el plej movemaj polaj reĝisoroj, kelkajn fremdajn aktorojn: belan daninon Agnes Petersen, edzinon de Ivan Mozzuchin, Viktoron Varconyi kaj aŭstrian teatran aktoron Friderikon Dellius. En unu el plej bonaj polaj „mutaj” filmoj „Forta homo” laŭ la romano de Przybyszewski, ĉefan rolon ludis Gregoro Chmara. En unua pola tonfilmo (pri „toneco” de tiu filmo mi jam skribis!) en „Moraleco de sinjorino Dulka” ludis tiel konata en tuta Eŭro-

po Dela Lipinskaja. En „Dangera Amo“ ni vidis faman heroinon de „Asfalto“, Betty Timman. Kaj nun oni ĵus finis en Warszawa filmon kun ĉeĥa humoristo Vlasta Burian.

Ofte tamen la kunlaboro estas pli forta. Nome ofte kelkaj diversnaciaj produktoj turnas kune filmojn speciale nun, en epoko de tonfilmo, tiu kunlaboro aktualiĝis. Kiel ekzemplon povas esti lasta kunlaboro de polaj kaj ĉeĥaj produktoj. Antaŭ nelonge oni finis en Varŝavo filmon s. t. „Dekdu seĝoj“ kun Vlasta Burian, Pogorzelska kaj Dymśa, kaj dum aŭtuno oni turnas en Praha du novajn filmojn polajn — ĉeĥajn.

Laste oni multe parolas pri la kunlaboro de ĉiuj slavaj produktoj.

La realigo de tiu plano estas t.e. dezirinda, sed la produktoj denove forĝis pri unu granda malfacilaĵo, nome pri la lingvo de tiuj filmoj.

Ne por ĉiuj slavoj la pola, ĉeĥa, ĉu alia slava lingvo estas tiel komprenebla. Kaj tamen, almenaŭ ĝis nun, pri ebleco de uzado de internacia lingvo neniu el la produktodirektoroj bedaŭrinde pensas. Eli.

### ESPERANTO EN TONFILMO.

Tiel malofte okazas, ke oni povu aŭdi esperantan lingvon en tonfilmo, ke ĉiu tia okazo estas tre notinda.

La 21 junion ĝis 6 julio okazis en Esperanto — Domo en Arnhem (Nederlando) Internacia Poŝtkurso organizita de Internacia Ĉeĥ Instituto. Parton de tiu kurso filmigis filmkompanio „Polygoon“. Oni povas tion kompreni kiel grandan sukceson, ĉar vidante kaj aŭdante tiun filmon la homoj komprenos kiel taŭgas Esperanto por tonfilmoj.

### ĈU VI SCIAS, KE...

...Nia samideano fama aktorino Anny Ondra edziniĝis al Max Schmeling, germana bokscampiono. „La Pirato“ atentigas, ke post kelka ekzercado, ŝi estos Anny... Tondra.

...Polaj produktoj anoncatis por venonta sezono dudek novajn filmojn. Sed nun evidentiĝas, ke tiu nombro malgrandiĝis ĝis dekkvar.

..Nova filmo kun Jan Kiepura. „La kanto por vi“ projekciata en Ameriko atingis rekordan sukceson. Ĝi restis nome sur ekrano pli longe ol aliaj eĉ tre famaj filmoj kun plej konataj artistoj.

...Plej menciinda el novaj polaj filmoj estas sendube „Historio de l' peko“ laŭ la romano de Żeromski. La rolon de Eva Pobratymśka ludas Karolina Łubieńśka. Ŝiaj kunludantoj estas: Damięcki kaj Samborski. Reĝisoris tiun filmon Henryk Szaro. Aperoj de tiu filmo sur niaj ekranoj prezentas sin kiel granda sensacio.

...Konata filmreĝisoro Ford finis jam sian delonge anoncatan filmon, kiun li turnis en Palestino. La filmo havas titolon „Sabra“. En tiu filmo ludas aktoroj de fama hebrea teatro „Habima“.

...Estas jam preta filmo de pola-ĉeĥa produktado s. t. „Dekdu seĝoj“. En ĉefaj roloj ni vidos: Vlastan Burian kaj Adolfin Dymśa. En aliaj roloj ludas Zula Pogorzelska, Biegański kaj Jarszewska. Reĝisoris Mac Frick kaj Michał Waszyński.

...Unua pola spiona filmo estas: „Spiono en la masko“. Reĝisoras M. Krawicz. En ĉefaj roloj: Hanka Ordonówna, Igo Sym, Samborski, Jerzy Leszczyński kaj Żelichowska.

---

## D I S T R A Ĵ O J

---

### I. ENIGMOKONKURSO.

La kvaran de septembro okazis en „Societo Esperanto, Kraków, Smoleńsk 9. je oka vespere lotumado de premioj de la unua enigmokonkurso. Tiun ĉi konkurson partoprenis gesanoj: Hanka Kantorowiczówna, Józef Bulski, inĝ. M. Chmieliński, Z. Zawadzki, Marja Lenczmar, Janusz Patalong, Stefanja

Unterweiserówna, Anna Rettizanka, Herman Kling, Andrzej Bałanda, Waza, Fela Zollman, Eugenjusz Pietrzak, Hans Hazenfuss (Riga).

Lotumadon tamen povis partopreni nur tiuj, kiuj atingis minimume 12 punktojn. Tial la nombro de la lotumatoj malgrandiĝis ĝis kvar unuaj.

La premiojn ricevis: I. Bulski Józef (Lubania n/Pilica). II. Ing. Chmieliński Michał (Nowogródek). III. Zawadzki Z. (Warszawa).

Samideanoj, kiuj gajnis premiojn, baldaŭ ricevos ilin.

Unu solvon ni ricevis de Latvio. Nia riga s-ano skribas: Ĉar la latviaj esperantistoj ricevas vian ĵurnalon je favoraj kondiĉoj ekde julio, mi bedaŭrinde povas partopreni nur la finon de via enigmokonkurso.

Pro la ekinteresiĝo la redakcio sendas al s-ano Hazenfuss gvidlibron „Pollando kaj Gdańsk“.

**Solvo de enigmo n-ro 6. Meblisto Kelnero Komercisto.**

### NIA DUA ENIGMOKONKURSO.

En venonta numero ni komencos nian duan enigmokonkurson. Nun ni alvokas ĉiujn al kunlaboro. Al tiuj, kies enigmoj estos presitaj, ni alkalkulos taŭgan nombron da punktoj. La enigmoj devas esti skribitaj nur sur unu paĝo. La solvo devas esti nepre kunmetita.

## NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

### EKSTERLANDO.

**Anglujo:** Dudek tre eminentaj britaj profesoroj subskribis manifeston. pledantan por la enkonduko de Esperanto kiel oficiala temo de instruado en lernejoj.

**Aŭstrujo.** Dum ĝenerala kongreso de Germanaj katolikoj okazas ankaŭ oficiala aranĝo de „Katolika Unuiĝo Esperanta“.

**Cehoslovakujo.** Faris tie grandan, sukcesplenan prelegvojaĝon, „nia“ jam tiel konata Kola Ajayi. Ekzemple en Tisovec, kiu havas 4.500 loĝantojn, venis al la parolado pli ol 1.000 homoj, kaj en Uhersky Ostroh preskaŭ duono de la tuta urbo. Entute okazis liaj 28 lumbildparoladoj en 20 diversaj lokoj, kun 10.550 auskultantoj. Krom tio dufoje kantis Kola Ajayi en Radio. Nun li forveturis Jugoslavujon.

**Francujo:** Jam en ses francaj departementoj ĝeneralaj konsilantaroj voĉdonis deziresprimon favore el la nedevisa instruado de Esperanto en lernejoj. — La regionan kongreson en Dunkerque partoprenis ankaŭ eksterlandaj delegitoj el Belgujo, Britujo kaj Nederlando.

**Holando:** La 29-an de julio oni inaŭguris Zamenhofan monumenton en Bergen op Zoom. Ĝi estas unua en Nederlando, kaj kvara en la mondo Zamenhofa monumento. Malkovris la monumenton f-ino Lidja Zamenhof, dum la orkestro ludis la polan himnon. Pacoladis la urbestro, Prezidanto de la Komerca Cambro, k. a. — La Internacian Esperantistan Poŝtkurson organizitan en Arnhem en julio de Cseh-Instituto partoprenis 118 personoj el Nederlando, Francujo, Svisujo, Hungarujo kaj Svedujo. La ĝenerala direktoro de la Nederlanda Poŝto, Telefono kaj Telegrafo speciale venis por viziti la kurson. La kurson vizitis ankaŭ f-ino Lidja Zamenhof.

**Japanujo:** La 15—17, de oktobro okazos 21. japana Kongreso de Esperanto.

**Rumanujo:** Kongreson de bulgaraj esperantistoj partoprenis granda rumana grupo. Poste la partoprenintoj vizitis ĉefurbon Bukureŝton, kie ili estis gastoj de urbestro kaj kie oficiale ekceptis ilin urbestro kaj Komerca Cambro.

**Sovetunio:** Radiostacio Mińsk disaŭdigas ĉiumonate 12-foje en Esperanto de 23,30—24 h. laŭ Moskva tempo.

**Svedujo:** En aŭgusto okazis en Stokholmo la XIII. kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda.

## KOMUNIKAJO EL JAMBOREE.

Dum Skolta Kunveno okazinta en Gödöllö aranĝita de Skolta Esp. Ligo dum daŭro de Tutmonda Skolta Tendaro en Hungario (1—15. VIII.) partoprenis pli ol 200 skoltoj-esp. el 22 landoj (ankaŭ ekstereŭropanoj). La skoltmuziko ludis la esp. - himnon. Oni sendis radiosalutojn kelkfoje en esp. lingvo kaj ĉiuokaze propagandis Esperanton. Dank' al senlaca laboro de hungaraj esp. - skoltoj kaj unuavice al s-ro P. Balkányi (SEL repr.) oni sukcesis aperigi kelka'n artikolojn priesperntajn en ĉiutaga tendar-gazeto. Ankaŭ eldono da diversaj poŝtkartoj kun esp. teksto, esp. - skolta vortaro, kaj esp. skoltaj kantoj multe helpis al la sericza esperanto - propagando. Ankaŭ ni devas mencii la aranĝitan esperanto - ekspozicion en la Esperanto skolta tendo. Inter aliaj ekpoziciaĵoj ni vidis tie-specialan polan fakon kun multaj bildoj, kartoj, flago ktp. senditan de Pola Distrikto de SEL. Inter aliaj propagandiloj oni disdonadis gvidlibron pri „Pollando kaj Gdańsk“ (oferitan donace, senpage tiucele de Pollanda Esp. Delegitaro), kiun eksterlandaj skoltoj povos ricevi ankaŭ nun senpage ĉe P. E. D. — Kraków, Lubicz 34 almetante nur 1. respondkuponon por poŝtelspezoj. Jen Esperanto por skoltaro efektiviĝas.

### POLLANDO.

**KRAKÓW.** Jam delonge la anoj de la „Societo Esperanto“ laboras por okazonta „I. Esperanta Semajno“ Krom tio okazis jena; prelegoj:

S-ano Zajczkowski: „I. Esperanta Semajno“.

S-ano Lichtenstein: „Lumoj kaj ombroj de kolonia kongreso“.

Nia fervora samideanino, jam bone konata verkistino, fraŭlino Irena Szczepańska presigas en tre populara semajna ĵurnalo „Na szerokim świecie“ sian novan romanon s. t. „Uprowadzona — Dziennik pensjonarki“. (Delogita-taglibro de studentino).

Krakova Esperantistaro perdis lasttempe unu el siaj eminentaj anoj, Dr-on Żupnik. Al familio de la mortinto la redakcio esprimas plej koran kunsenton.

**LWÓW.** Ekmemorinte pri alproksimiĝo de t. n. „Kukuma sezono“, dum kiu eĉ muŝo en esperantaj societoj ne zumas, ekdecidis du viglaj niaj animoj in'ekti al gesamideanaro grandan porcion da nutraĵo revivigonta ĝin en daŭro de silenta malabunda koncerne prelegojn — somera libertempa periodo. Unu el ili „energige tre bonhumorega, temperamenta kaj eminenta vienanino, ĉarmegulino“ en unu persono Minuška Mantel montris kiel „Mi-nuška esperantistiniĝis“. „Montris“, ĉar tio estis pli teatra gaja aspekto, ol parolado. Moviĝemaj manetoj allogajn figurojn desegnis, la grandaj okuloj fajrerojn ŝprucis kaj el inter blindige blanka dentaro torentis gajigaj vortkaskadoj kun malsekiĝintaj pro rido rigardiloj kaj ŝveliĝintaj pro senĉesa kunfrapado manoj, ekokupis ŝian lokon — nia aminda „Lena“ — Leonja Fruchtówna. Estas korpuzo vidi nian „Cseh pastrinon“, kiu ĉarme ridetante, belokule — gustigas al ni, fervoraj aŭskultantoj — perlojn — frandaĵojn el siaj literaturajoj.

**NOWA WIEŚ.** Okaze de la Cseh-kurs fino aranĝis la ĉi tiea Katolika Esp. Rondo sabate la 17. 6. en la salono de Bialdyga amuzan vesperon, al kiu estis invitataj ĉiuj esperantistoj de l' ĉirkaŭaĵo. Oni vidis gesamideanojn el Nowy—Bytom, Hajduki kaj Świętochłowice. Ĝojege bonsalutis nia kara prezidanto s-ro Gajda pli ol ducent partoprenintojn. Post la komuna kanto de Esp.-Himno sekvis prologo, deklamita de juna fraŭlino Leśniczanka, kaj verkita de ano K. E. R. Nun sekvis la festprelego. La preleginto parolis pri la graveco de publika festoj esperantistaj. Post tio alternis en multkolora vico kantoj, deklamoj kaj muzikajoj de niaj kursanoj. Multe plibeligis la vesperon nia ano, kantisto s-ro Erwin Nowak. Aparte oni devas mencii dancojn de papilioj kaj buboj, kiuj estis ekzercitaj de instruistino f-ino Robaczyńska. Disdonante la atestojn, dankis la Cseh-instruistino s-ino Borzykowska al la estraro de K. E. R., kaj al la gekursanoj, por ilia senekzempla fervoreco. Por fini la oficialan parton, oni kantis la esperantigitan polan himnon nacian. „Di, kiu nian...“

Kaj nun eksonis violonoj kaj aliaj muzikinstrumentoj, kaj junaj kaj maljunaj, knabegoj kaj knabinegoj turnadis laŭ valsa-mazurka bostono aŭ tanga ma-

niero, ĝis la senkora gastejmastro finigis la agrablajn horojn, ĉar la malbona objekto (horloĝo) montris jam la 2-an, la polican horon. Bedaŭrinde la disiĝa horo venis kaj ni adiaŭis niajn karajn gastojn, esperante, ke ne estis lastfoje, ke ni tiel multnombre kunvenis.

### B I B L I O G R A F I O.

**SELMA LAGERLÖF: LA MONO DE SINJORO ARNE.** Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 1. 110 paĝoj. Prezo: broŝ. sved. kr. 1. 50.

Selma Lagerlöf, la plej fama verkistino sveda, distingigatas per sia stilo neordinara. En ŝiaj libroj abundas legendoj el malnovaj tempoj, sed la legendoj rerakontitaj de ŝi estas ne nur legendoj plenaj de fantazio, sed ŝi donis al ili novan vivon kaj sencon. Ŝi estas granda psikologistino, kiu scias tre profunde analizi la homajn karakterojn laŭ maniero neordinara, ŝia stilo estas ĉarma, riĉa kaj bela. Ŝia verkaro estas tre granda, sed ĝis nun aperis en esperanta traduko nur unu verko (La junulino el Stormyr).

Nun aperis la dua verko, rakonto el la dekseca jarcento. Pri la enhavo de la libro ni ne rakontu tie ĉi, ni volas nur diri, ke ĝi estas pli tipa por la verkado de Lagerlöf ol estis „La junulino el Stormyr“.

La tradukon faris la bone konata sveda verkisto Stellan Engholm.

Laŭ la eksterajo la libro estas bela. La kovrilo estas desegnita speciale por la esperanta eldono de sveda artisto.

**GVIDLIBRO TRA LA UNIVERSITATURBO TARTU.** Eld. Akademia Kooperativo Tartu, 28-paĝa. Prezo ne montrata. Bela kaj instruciĉa enhavo, kun multaj bildoj kaj plano de Estonio kaj de urbo Tartu. Multaj utilaj sciigoj pri historio kaj vidindaĵoj en Estonio. Libreto tre rekomendinda.

**UNUA SLOVAKA KRISTANA PRINCO** — 14 paĝan broŝureton eldonis sub tiu titolo la Komitato de Pribina - festoj en Nitra, okaze de mil-cent-jara datreveno de konstruo de unua kristana preĝejo en ĉeĥoslovaka teritorio. La broŝuron kompilis kaj el la slovakaj tradukis Stan. Kamaryt, (del. de UEA en Bratislava) laŭ verko de d-ro J. Hodál.

**JARLIBRO DE TUTMONDA ASOCIO KOLEKTANTA (TAK) POR 1932-3.** Kompilis D-ro Jozefo Takács, prezidanto de TAK. Prezo: 0.60 sv. fr., por membroj de Tutmonda Asocio Kolektanta senpage. Mendebila ĉe kasisto s-ro F. V. Mizera, Jablonné n. Orli., Ĉeĥoslovakujo.

Sur 32 paĝoj estas priskribita la celo de unika esperanta organizaĵo por kolektantoj, Tutmonda Asocio Kolektanta, ĝiaj reguloj, interna aranĝo kaj la agado. La listo de membroj kompletigas tiun por ĉiu kolektanto tre necesan kaj utilan publikacion.

Loko.

**N o v a j l i b r o j:** „Universala Terminologio de la Arkitekturo“ kun 6—8 lingva traduko de ĉiu radikvorto, 218 pĝ.

Esperanta lernolibro en lingvo... latina. Jen ĝia titolo: „Cursus completus Esperanti, tironum usui accommodatus, comparationibus cum potioribus linguis Europae, Asiae et Africae cum glosatorio esp.-latino.“

„Forpelataj homoj“ de Can Hjokŝu (el japana). „Ĉirkaŭ la mondo kun la verda Stelo“ originale de Scherer. Prezo 4 gmk. Jam antaŭ apero estis menditaj duonmilo da tiu libro. Ĝi priskribas la Scherermondvojaĝon, dum kiu li havis 300 prelegojn antaŭ ĉ. 100.000 personoj kaj 22 radioprelegojn. Pri lia vojaĝo aperis pli ol 1.000 artikoloj en 25 diversaj lingvoj.

**N o v a j g a z e t o j:** „Internacia Polica Bulteno“. Monata polica fakjurnalo. — „La Egipta Espero“ organo de egiptaj esperantistoj.

„La Semisto“ monata organo de Cen Can Esp. asocio Ĉinujo.

„La Pirato“ kajero por Satiro, Humoro kaj Libereco... relativa „Sipestro“, konata sufiĉe Raymond Schwarz.

Eli.

### GRAVA PAŜO ANTAŬEN.

Pola Telegrafa Agentejo (PAT), unu el la plej grandaj en Polujo, publikigas en sia ĉiutaga bulteno interesajn novaĵojn, ricevatajn per Esperanto aŭ tiujn-ĉi el Esperanta mondo. La bulteno de PAT. estas dissendata al ĉiuj gazetoj, jurnaloj, revuoj en Polujo. Abonas ĝin diversaj ministerioj, aŭtoritatuloj ktp.

Estas grave, ke oni alsendadu konstante interesan kaj legindan materialon (pri literatura, scienca, socia, komerca ktp. vivo, pri interesaj eldonaĵoj, pre-



legoj, diversaj eltrovaĵoj ktp.) al s-ro Antoni Pisarski, Polska Agencja Telegraficzna — Pola Telegrafa Agentejo, Warszawa, str. Królewska 5. aŭ al s-anino Halina Weinstein, Vic-Delegitino de UEA, Warszawa, str. Leszno 99/5, kiu estas en ĉiama kontakto kun la menciita agentejo kaj servas, kiel tradukantino.

### RADIO — AFEROJ.

Esp. en polaj radiostacioj reaŭdiĝos post la libertempa paŭzo. La plej proksima prelego okazos la 20-an de septembro (merkredo) je la 22 h. (Warszawa, Kraków kaj verŝ. aliaj relajsoj). Parolos s-o T. Hodakowski pri la Viena venko de Sobieski. Aŭskultu pri pluaj disaŭdigoj. Informoj sekvos post la prelego en „radiokesto“. Ne forgesu esprimi vian kontenton al la direkcio.

### AL EKSTERLANDAJ FILATELISTOJ!

Okaze de 400-jara mortotaga datreveno de la genia skulptisto Wit Stwosz, aperis bela pm. en valoro de 80 groŝoj, prezentanta parton de la altaro de Wit Stwosz en St.—Maria preĝejo en Kraków. La dua, belega pm., en valoro de 1.20 złoty, aperis okaze de 250-jara datreveno de Viena liberigo kaj prezentas la pentraĵon de la fama, pola pentristo Matejko „Sobieski apud Vieno“.

La unuan pm. oni povas ricevi sur rekomendita pk. kontraŭ 2 respondkuponoj kaj la duan kun aldono de 30 groŝa pm., eldonita okaze de 200-jara naskiĝtaga datreveno de Washington (prezentas bildon de Washington, Pułaski kaj Kościuszko), sur rekomendita letero kontraŭ 3 respondkuponoj. Skribu al Ludwik Kutscher, Kraków, Grodzka 9.

Oni petas la redakciojn pri represo.

---

Serĉas kunvojaĝanton tra Polujo de 1. X. — 18. X. 1933. Edmund Jarczowski, Warszawa, str. Leszno 99/5. Programo priparolota.

---

### LEGANTOJ DE „POLA ESPERANTISTO“ ATENTON!

Specialaj favoraj abonkondiĉoj de eksterlandaj revuoj!

Ni sciigas niajn est. abonantojn, ke ĉiu el ili povas ricevi la revuon de estonaj Esperantistoj „Informoj de Esperanto - Asocio de Estonio“ ĝis fino de la k. j. post enpago de zł. 1.20, same la revuon de latvaj Esperantistoj „Ondo de Daŭgava“ ĝis fino de la k. j. post enpago de zł. 1.20, aŭ ambaŭ gazetojn ĝis fino de la k. j. post enpago de zł. 2.20. Ni esperas, ke niaj ŝat. legantoj ekuzos la okazon ricevi por tute favora prezo la revuojn de niaj nordaj samideanoj! Nia PKO — konto Nr. 406.660. Enpagu tuj! Nombro da abonantoj limita!

### PRZEDSTAWICIELE — REPRESENTANTOJ:

Białystok — Esperanta Societo Zamenhofa, Polna 4.

Katowice — Societo de Esperanto Amikoj, Wawelska 3.

Paryż — S. Grenkamp, 117. Bd. Jourdan.

Warszawa — Pola Stud. Esperantista Societo, Leszno 99. m. 5.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) prenumerata roczna zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 34.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70. duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

KONTO P. K. O. NR. 406.660